PREZO: 1:– Kr.

Sturetr. AB. Sthlm 1950

# MALGRANDA REVUO

Nro 3 · 1950
8a JARO

ENHAVO:

| | Paĝo |
|---|---|
| Max Nordau, de J. Kohen-Cedek | 1 |
| Ĉu postmorta vivo estas dezirinda? de Max Nordau | 11 |
| Homaranismo kaj etiko, de James D. Sayers | 13 |
| Evangelisches Johannesstift en Berlin-Spandau, de Hellmut Otto | 16 |
| Kometoj kaj areolitoj, vaguloj en la universo, de K. Wilgenhof | 22 |
| Komentoj | 27 |

*Redaktoro — Eldonanto:*
*STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO*

MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin afranko por resendo.

## Perantoj

Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.

Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel W.

Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).

Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9, Praha.

Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago N.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.

Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 3 8a JARO 1950

# Max Nordau

De J. KOHEN-CEDEK

Antaŭ nelonge la universitatoj en Sorbonne, Buenos Aires kaj Jerusalem kaj krome kelkaj eŭropaj kaj transoceanaj specialfakaj sciencaj institutoj aranĝis solenajn akademiajn kunsidojn kun referatprelegoj al la glora memoro de dro Max Nordau, okaze de jarcento post lia naskiĝo.

Tamen ŝajnas, ke la sendanka mondo forgesas tiun nomon, kiu sur la limo inter la pasinta kaj la nuna jarcentoj estis unu el la plej famaj kaj popularaj. Multe kulpas pri tio la germana reĝimo, kiu ekregis 1933 kaj kiu penis per leĝmalpermeso kaj bruligo de liaj libroj forgesigi lian nomon. Tial necesas memorigi al la nuntempa legantaro pri tiu publicisto-filozofo, kiu ne nur influis al la memkonscio, sociopinio kaj artgusto de la tiutempa progreseme pensanta inteligentularo sed kiu eĉ — kiel oni tiam diris — "formis la konscion kaj la konsciencon de Eŭropo". Multaj aferoj nun ĝenerale aprobitaj estis unue formulitaj ĝuste de li, kaj dank' al lia idebatalo ili fariĝis memkomprenebla komunposedaĵo.

Max Nordau ne estis kabineta filozofo. Li estis publicisto, populariganto de ideoj kaj fervora batalanto per plumo kaj vorto por ilia aprobo. Li multe influis al la spirita vivo kaj pensmaniero de Eŭropo. Li estis fakulo pri multaj sciencoj (ĝenerala medicino, psikiatrio, biologio, sociologio, lingvistiko, artoj, historio), kaj li bazis siajn esplorojn sur la plej novaj konkludoj de la tiutempa scienco. Li estis la unua scienculo, kiu enkondukis la naturalisman esplormetodon en sociologion. Kiel morkritikisto li senkompate vipis ĉiujn anomaliajn aperojn kaj patologiajn simptomojn en la kulturvivo. La eŭropan kulturon li perceptis kiel integre unuspecan historiproduktón kaj tial postulis ĝian politikan unuiĝon. Li estis vasthorizonta kosmopolito kun universala spirita idearo.

*

Meir' Südfeld naskiĝis la 29an de julio 1849 en Pest. Budapesto tiam ankoraŭ ne ekzistis. Lia patro, rabbi Gabriel Südfeld, aŭtoro de kelkaj hebrelingvaj dramoj, poemoj kaj aliaj verkoj, estis rabeno kaj privata instruisto, homo tre malriĉa sed altgrade idealista. Lia influo al la filo estis granda kaj ĝiaj rezultoj fruktoriĉaj. La knabo estis nur 14jara, kiam loka



*Max Nordau*



germanlingva ĵurnalo aperigis lirikan poemon de li, subskribitan per la pseŭdonimo Max Nordau. Post jardeko tiu pseŭdonimo fariĝis lia oficiala nomo. Kiel gimnaziano Nordaŭ en la lastaj klasoj estis jam fama teatrokritikisto, lerta eseisto kaj artikolverkanto, kunlaboranto de multaj gazetoj kaj ĵurnaloj en Pest. Kiel medicina studento en Vieno li diligente kunlaboris en multaj disvastigitaj germanaj, aŭstriaj kaj hungaraj periodaĵoj. Dum la granda viena ekspozicio en 1873 liaj korespondaĵoj kaj felietonoj estis avide glutlegataj en la tuta centra Eŭropo.

La ĉefaj trajtoj de lia verkmaniero konsistis el trafa elekto de aktuala temo, traktata el vidpunkto moralfilozofia, sociologia kaj belarta "sub specie aeternitatis". Li komprenis majstre streĉi la atenton per facilmaniera enprofundiĝo en la plej komplikajn filozofiajn problemojn, trovante okulfrapajn komparojn kaj reliefajn nekutimajn klarigrimedojn. La riĉo de lia stilo kaj dialektiko estas preskaŭ nesuperebla. La traktmaniero estas ofte konversacia, iam bonhumora, ie ironia kaj foje sarkasmoplena, ĉiam nuancoriĉa — de tono lirike sentimentala ĝis altpatose emfaza. Liaj frazoj, kvankam multparolaj, estas ciam graciaj kaj brilantaj de dissemitaj aforismoj kaj frapesprimoj. La konkludoj distingiĝas ĉiam pro originaleco de pensoj, ofte eĉ paradoksaj kaj eksterkutimaj.

Kiam li ankoraŭ estis juna studento li kiel gazetkorespondanto entreprenis rondvojaĝon tra ĉiuj kulturcentroj de Eŭropo. Ĉie li estis kore akceptata, en la malriĉa dometo de la jam maljuna H. C. Andersen same bonvole kiel en la reĝpalacoj de la dana Kristian IX kaj la sveda Oskar II. Dum la vojaĝoj li interamikiĝis kun multaj elstaraj personoj. Kelkaj el ili restis por ĉiam liaj kolegoj, kiel A. Wambery, Ed. Lasker, Fr. Spielhagen, B. Auerbach, Th. Graham, V. B. Ibañes, A. Venizelos, E. Renan, R. Leoncavallo, A. Dumas (la filo), C. Flammarion kaj Björnstierne Björnson. Sed liaj plej intimaj amikoj estis: lia samurbano dro Th. Herzl kaj la kopenhaga verkisto Richard Kaufmann. Kiam Kaufmann (kiu tradukis liajn verkojn en la danan) poste mortis, lia vidvino, dana kristanino kaj virino distingita per altaj animkvalitoj, fariĝis edzino de Max Nordau kaj patrino de lia filino.

Vizitante la skandinavajn landojn Max Nordau spertis lingvajn barojn. Li eĉ ne povis libere konversacii kun sia adorata Andersen, kiu ne sciis fremdajn lingvojn.

"Kial mia mondordo estas tiel difektoplena kaj neperfekta? Kial la homoj, reciproke similaj kaj egalaj, ne povas senĝene kaj senpene interkompreniĝi pere de ia certa lingvo? Kial baras inter ni la lingvodiferencoj? La rasaj kaj koloraj diferencoj ne estas ŝanĝeblaj. Sed ĉu ne devas almenaŭ la tuta blankrasa mondo formi unupopolan grandan familirondon? . . ."

Tiel plendas Nordau en sia vojaĝpriskriba kaj observa verko "De Kreml ĝis Alhambra" — lia unua libro, kiu portis al li mondfamon.

Por rompi la lingvajn barojn Nordau diligente lernis en ĉiu lando ĝian lingvon, kaj dank' al sia eksterordinara lernopovo li fariĝis poligloto. Li sciis senriproĉe 14 modernajn kaj 4 antikvajn lingvojn, kaj en multaj el ili li kapablis verki, sed por tiu uzo li preferis la gepatran — la germanan. Dum la mondekspozicio en Parizo 1878 li malfermis la unuan kongreson de "Association littéraire internationale" por defendo de kopirajto, kaj tiam li senhezite kaj senprepare ekparolis latine. Verŝajne li longe serĉis la solvon de la lingva problemo; sed ĝuste kiam ĝi estis trovita, li estis tro okupita de tute alia agado . . .

Ricevinte la doktorecon en 1876 Nordau elektis Parizon, la tiaman ĉefurbon de la tutmonda kulturo, kiel konstantan loĝlokon, kie li daŭrigis siajn sciencajn studojn sub gvido de la mondfamaj profesoroj J. M. Charcot, J. Martineau kaj C. Lombroso. Li kunlaboris en ĝeneralaj kaj sciencaj gazetoj kaj aperigis sian fakan esploron "La kuracado de virinaj seksomalsanoj". Sed speciale li interesiĝis pri nervaj kaj spiritaj malsanoj.

Dume aperis lia novelaro "Sapvezikoj", liaj kritikobservaj verkoj pri Parizo kaj la nedemokratia vivpraktiko de la tiama Francujo, "En lando de veraj milionuloj" kaj "Parizo dum la IIIa respubliko". Liaj dramoj kaj komedioj "Lukto de milionuloj", "Li estis en Parizo", "Moderntempaj ĵurnalistoj" (unua prezentado en Helsinki), "La rajto ami" (unua prezentado en Kopenhago) ne havis grandan sukceson. Sed grandegan sukceson havis Nordau kiel brilega kaj elokventa prelegisto. Liaj



paroladoj, ekz. "Don Juan kaj Faust", "Mondo latinida kaj germana", havis grandan resonadon kaj estis vigle debatataj en la ĵurnaloj. En la lasttema paroladciklo postulis Nordau kulturan kaj ekonomian kunlaboron de ambaŭ "mondoj", kiu sola garantios tutmondan pacon.

En 1883 aperis lia unua ĉefverko, kiu fariĝis sensacio. En mallonga tempo oni tradukis ĝin en ĉiujn eŭropajn lingvojn kaj en multajn aziajn (hebrean, turkan, ĉinan, japanan), kaj ĝi havis multajn sinsekvajn eldonojn (en la germana 65!).



*La tombo de Max Nordau en Tel-Aviv*

Ĝi estis "La konvenciaj mensogoj de la kultura homaro". En tiu verko la aŭtoro pruvas la falsecon de multaj moroj, de kondiĉoj kaj sociinstitucioj de nia nuna kulturvivo, kiuj estis historie kreataj kaj de ni heredataj sed tamen bazitaj sur sintrompo aŭ mensogo, de la praa institucio de geedziĝo ĝis la eklezio, de simplekutima kaj scienca superstiĉo ĝis la ideo de monarkismo. La aŭtoro kontraŭbatalas la hipokritecon kaj la bigotecon de nia privata, societa kaj civitana vivo, esploras la devenon de la religiaj sentoj kaj kritikas niajn sociajn kaj ekonomiajn interrilatojn, aplikante al la esplorado la koncernajn konkludojn de biologia, antropologia, sociologia kaj psikologia sciencoj. Kiel antikva profeto li senkompate vipis la malperfektaĵojn de nia vivo, kuraĝe kaj sentime atakante la tutan rutinan putraĵon de la mondo.

Kaj la mondo eksiblis kiel serpento, kies voston oni piedpremas. La Vatikano kondamnis la legantojn al la eterna Geheno, ĉar la libro subfosas la fundamentojn de la Diekleżio. La rusa cara kaj la aŭstria cezara-apostola majestoj malpermesis kaj konfiskis la libron, kiu ironie pritraktis la dioestablitan, heredan institucion de privilegiita aristokrataro kaj la ideon de aŭtokratia monarkio. La aŭstria malpermeso estis baldaŭ nuligata por ne devigi okazigon de skandala, publika kasacia juĝoproceso. Sed en Rusujo al ĉiu trovita posedanto de la libro minacis Siberio. La rusaj revoluciaj rondoj tamen aranĝis kaŝajn komunlegojn, kaj la libro estis sendata al ili el eksterlando en fermitaj privatleteroj, distranĉita en malgrandajn kajerojn.

Max Nordau kredis, ke li per tiu verko liberigos de ĝiaj katenoj la homaron, kiu vekiĝis al kritekema pensado kaj detruos la fundamentojn, sur kiuj staras la ankoraŭ potencaj sed vane adorataj, falsaj diidoloj.

En 1885 aperis nova sensacia verko de Nordau, "Paradoksoj". Ĝi estas brila, profundsenca sed facile legebla studeto, kiu konsistas el 16 diverstemaj malgrandaj ĉapitroj. En ili la aŭtoro analizas kelkajn sociajn fenomenojn, denove detruas kelkajn komunadoratajn idolojn kaj trovas tute novajn vidpunktojn pri problemoj, ŝajne klarajn kaj ne dubindajn. Ĉu pravas la pesimisma mondkoncepto? Kia estas la valoro de la filistro en



nia socio? Pri kio devas temi la beletristikaj verkoj? Kiaj faktoroj formas la naciecon? Jen kelkaj temoj traktitaj en la libro. La aŭtoro ŝajne defendas en ĝi neracian kaj kontraŭlogikan vidpunkton. Sed post lia brilforma, aforismoriĉa kaj profunda analizo, la leganto atingas al okulfrapaj sed nekutimaj konkludoj. Preskaŭ ĉiuj el ili jam fariĝis aboco de la progresama mondo, sed tamen la libro ĉiam ŝajnas nova kaj aktuala.

Post Paradoksoj aperis liaj romanoj. "Malsana jarcento" estas beletroforma psikologia esploro pri la dolora humoro, kiu regis en la socio de la "fin de siècle" (jarcentofino), kiel li trafe difinis sian epokon — pri la pesimismo. Nordau esperis per ĝi kuraci sian tempon de la neŭrastenio, kiu tiam regis en larĝaj socitavoloj. La sekvanta romano, "Komedio de sentoj", okupiĝis pri alia psika anomalio, la paroksismo en la amo . . . Nur la romano "Dies irae" ne estas bazita sur patologiaj fenomenoj. Ĝi estas protesto kontraŭ alispeca socia malbono, kontraŭ borsspekulaciaj fiaferoj.

La mondfama astronomo C. Flammarion interesigis Nordau pri spiritismo, sed post kelktempa serioza esploro de tiuj psikaj fenomenoj Nordaŭ konvinkiĝis, ke ili nenion enhavas krom sugestio kaj memsugestio.

En 1892 Nordau denove incitis la tutan legantan mondon. Aperis lia nova, plej sensacia libro, "La degenero". Ĝi estas kritiko de la plej modernaj tiutempaj societaj, artaj kaj literaturaj modoj, ekz. snobismo, dekadenco, simbolismo, mistikismo, egocentrismo ktp. Ĝi baziĝas sur studrezultoj de psikofiziologio laŭ Charcot kaj speciale sur la esploroj de prof. C. Lombroso koncerne la problemon de genieco kaj frenezo. La libron Nordau dediĉis al Lombroso, kies fervora adepto li ĉiam estis. En la dediĉlinioj li klarigas interalie:

". . . La degenerintoj ne ĉiam estas la malkaŝaj krimuloj, malĉastulinoj kaj frenezuloj. Okazas, ke ili estas . . . famaj verkistoj kaj modonfiksantaj artistoj . . ."

Kaj ĉar la beletristiko kaj la artoj influas al la popolamasoj kaj la junularo, kiuj kreas laŭ ili siajn etikajn kaj estetikajn idealojn, Nordau atakis la psikomalsanigajn, patologiajn influojn de degenerado en la kampo de artoj kaj literaturo.

La verko elvokis tutmondan ekscitiĝon kaj bruegon. La kritiko kaj la publiko sentis sin ofenditaj: multaj el iliaj idoloj estis prezentitaj de Nordau kiel spirite malsanaj, idiotoj aŭ trompantoj. Kaj se oni ĝenerale eĉ akceptis la ĉefajn premisojn kaj tezojn de la nova verko, esprimitajn en la kvarĉapitra enkonduko (1. Fin de siècle, 2. Simptomoj, 3. Diagnostiko, 4. Etiologio) oni tamen ne povis konsenti kun la finkonkludoj. Eĉ tiuj, kiuj konsentis kun la aŭtoro, ke Nietzsche, Dostojevskij kaj Verlaine estis homoj anime nenormalaj kaj ilia kreado ne normalsana, ne povis same taksi tian grandegulon de homa penso kiel L. N. Tolstoj. La ekstrema Nordau sendube multe troigis. Sed lia ĝenerala principo tamen venkis; la malsanecaj modoj ne radikis, kaj kelkaj el ili eĉ rapide forpasis.

*

La jaro 1895 ŝanĝis la vivovojon de Max Nordau. Tuta Francujo tiam baraktis en la paroksismo de la Dreyfus-afero. Sur la parizaj stratoj aŭdiĝis sovaĝaj krioj: "Mort aux Juifs!" (morton al la judoj!).

Ili vekis la mondcivitanon el la kosmopolitaj sonĝoj al la griza realo. Ili memorigis al li, ke li estas filo de senlanda popolo. Nordau renkontis alian d:ron "hungaron", Theodor Herzl. Tiu legis al li sian ĵus verkitan planon de "Juda ŝtato" kaj rimarkigis, ke oni opinias ĝin utopia kaj lin mem frenezulo.

— Do, ankaŭ mi estas frenezulo! respondis Nordau.

Kaj la du amikoj ekagis. Ili fondis la t. n. "cionistan organizon", kunvokis 1897 en Basel ĝian unuan kongreson. Nordau kunredaktis la programon kaj la statuton de la asocio, fariĝis ĝia propagandisto kaj la centra figuro en ĝi. Ĝuste al li maltrafe pafis iu fanatikulo pro certa propono en la kongreso. La paroladoj de Nordau estis ĉiam la sensacia punkto de ĉiu kongreso, kaj liaj flugvortoj fariĝis ĝiaj devizoj (ekz. "Donu al land' senpopola popolon sen lando!" Aŭ: "Ni iru en dezerton por disvastigi la spiritajn limojn de Eŭropo!").

Post la morto de Herzl 1904 Nordau rifuzis okupi la liberan prezidan seĝon de la tutmonda cionista organizo; li deziris reveni al sia literatura laboro. Sed la verko jam tenis sian majstron. Nur la unua mondmilito, kiun li devis travivi en Madrid, en ekzilo de sia amata Parizo, ebligis al li reveni al literatura agado. Sed tuj post la milito kaj post la t. n. Balfour-deklaro li estis vokata al Londono por gvidi la cionistan centron. Tiam eksplodis lia kverela polemiko kontraŭ prof Ch. Weitzmann, la nuna israela ŝtatprezidanto. La disputo estas karakteriza por la mensoj de ambaŭ. Palestino (kune kun Transjordanio, kiu ankoraŭ ne estis apartigita) havis duonmilionon da arabaj loĝantoj. Nordau postulis tujan enmigron de duonmiliono da judoj (el la postmilitaj senhejmuloj), kiuj kune kun la palestinaj judoj tuj formu la judan plimulton en la lando. Tiel la korelativa loĝantonombro estos unu fojon por ĉiam reguligita per la juda plimulto. La tutmonda cionista organizo vivtenu la enmigrintojn ĝis la unua venonta rikolto. Sed prof. Weitzmann postulis poioman enmigradon kaj laŭpaŝan koloniigon de tereno aĉetota. Dum la diskutoj la angloj organizis la araban "malkontenton", provokis malpacaĵojn kaj ricevis pretekston limigi la enmigron. La minimuma programo venkis: la kreo de la juda ŝtato prokrastiĝis per 30 jaroj kaj efektiviĝis, malgraŭ ĉies deziroj, nur "manu militari" kaj en tre malvasta kadro de kripligitaj ŝtatlimoj . . .

La cionista agado de Nordau tamen ne tute forrabis de Eŭropo ĝian plej aktivan gvidanton. En 1905 aperis lia romano "Morganata", en 1908 la kritikverko "La hispanaj artaĵoj kaj iliaj kreintoj" kaj en 1911 liaj brilaj, laŭ enhavo filizofiaj, porinfanaj "Fabeloj", rakontitaj al lia filino Maksa (nun konata pentristino en Parizo).

En 1908 aperis lia lasta sensacia verko "La kompreno de la historio". En tiu studo pruvas la aŭtoro, ke la mondhistorio estas ne disciplina fako sed tipa kvazaŭscienca, en kiun penetris pro ĝiaj dedukta kaj apriora metodoj ĉiuj ŝajnoj, fantazioj kaj superstiĉoj de niaj "metafizikaj kaj teologiaj humoroj". Ĝiaj tendencoj fakte estas tiuj, kiujn ĝiaj komentistoj interprete aldonis. La historirakontado kutimas atribui al siaj herooj intencojn, kiujn ili vere neniam havis, kaj al disaj nekunigeblaj okazintaĵoj ĝi atribuas laŭplanan kunaperadon neniam ekzistintan. Verdire la historiorakontado mencias tute diversajn faktojn, kiuj posedas nenian konkludigan rezonkonstruon, kaj kiu ajn povas trovi en ili ĝuste tion, kion li serĉas.

En 1914 alarmis Nordau en la influhavaj gazetoj de ambaŭ

kontinentoj por ke oni haltigu la proksimiĝantan militon. Sed la logikeco falis mortige trafita de la sarajeva pafo.

Lia sekvanta ĉefverko estis "La biologio de la etiko" (1917). Tiu esploro studas la problemojn, kiel kreiĝis la moralo, kia estas ĝia socia signifo, kio estas persona moralo kaj kio socia, kial ĝi konformiĝas al justeco kaj progreso. La konkludoj estas, ke la etiko kaj la civilizo devas reciprokrilate adaptiĝi unu al la alia por plifaciligi la ekzisteblon de la individuo en la socia vivo. La etiko mem progresas kaj ŝanĝiĝas. La fina postulo de la libro estas, ke la ŝtatnacioj akomodiĝu al superregado de tutmonda leĝaro de unuigita naciaro, same kiel privatulo devas obei al ŝtata leĝaro.

La lasta verko de Max Nordau estas "La esenco de moralo". La libro estis finskribita sed ĝia lasta ĉapitro ne finredaktita pro la trolaciĝo, de kiu Nordau suferis dum la vesperiĝo de sia vivo. La neapero de tiu verko estas sendube granda perdo por la progresema penso. Laŭ atesto de la vidvino, sinjorino Anna Nordau (en ŝiaj "Memoroj") unu el la plej esprimfortaj ĉapitroj en tiu verko estas titolita "La organizo kaj la individuo", kaj ĝi pledas kontraŭ la sklavigo de la individuo por la bono aŭ utilo de la organizo (partio, klaso, nacio, ŝtato). Kiu scias? Eble apero de tiu libro estus povinta iom haltigi la venkomarŝon de la du plej grandaj kontraŭmoralaj histerioj tra la mondo, de la du regresaj fortoj, kiuj nuligis la ekzistvaloron de la individuo, sanktigis la ŝtaton kaj diigis ĝian Gvidanton: la movadoj ruĝa kaj bruna!

Max Nordau mortis 1923 en Parizo. En 1926 oni transportis liajn postrestaĵojn al Israel (tiam ankoraŭ Palestino) kaj entombigis ilin en Tel-Aviv, dum la "tuta" tiama loĝantaro partoprenis tiun funebran procesion.

---



# Ĉu postmorta vivo estas dezirinda?

De *MAX NORDAU*

(Fragmento el "Kio okazos post la morto?" London, 1916.)

La morto estas estingiĝo de la konscio kaj plena ĉesigo de la persona ekzisto.

Estas kompatige observi, kiel eĉ pensosobraj scienculoj timplene retiriĝas de tiu ĉi koncepto kaj pro malespero forkuras en nebulajn iluziojn pri postmorta vivo.

Sed ĉu postmorta ekzistodaŭro estas tiel dezirinda? Ĉu ĝi vere valoras ĉiujn prelegojn pri ĝi? Sufiĉas seke analizi la penson por konvinkiĝi, ke ĝi estas vantega, bagatela iluzio, kiun eltrovis la imaga kapablo de spirite infanecaj homoj.

Tamen, supozu ni momente, ke postmorta vivo efektive ekzistas.

Rilate al la kvalitoj de la homa animo, liberiĝinta de la katenoj de ĝia formortinta korpo kaj ŝvebanta en iaj nedifinitaj sferoj, povas ekzisti du antaŭkondiĉaj premisoj: ke (I) ĝi plene konservis siajn memorkapablon, sentojn, komprenpovon kaj ĉiujn aliajn trajtojn de sia enkorpa memeco, aŭ (II), ke ĝi forgesis kaj perdis ĉion tion, kune kun la enkorpa ekzisto.

En la lasta kazo la animo jam ne daŭrigas nian memon kaj ne portas nian personecon, kiu tiel strebis al senmorteco. Ĝi jam estas alia, tutfremda, eĉ indiferenta, kies eterneco jam ne povas nin interesi pli ol la detruiĝo de niaj korpoĉeloj. Kian signifon por ni povas havi tia eterneco, se ni ne povas plu ami la amindan kaj malŝati la malsimpatian, se forpasos niaj memoroj pri la pasinta tervivo kun ĝiaj okazintaĵoj, ĉu gravaj ĉu sensignifaj, plenaj de ĝojo kaj bedaŭro, se la animo nenion scios plu pri niaj surteraj emocioj, pri niaj sentoj amaraj kaj dolĉaj, pri niaj honoraspiroj, korstreboj, disreviĝoj, misteroj kaj konsoloj — unuvorte, se nia animo nenion komunan havos kun nia surtera personeco, kies vivo ŝajnis al ni tiel grava kaj tiel signifoplena? En tiu ĉi kazo ne *mi* estas la postvivanto, kaj la eterneco de tiu fremdiĝinta animo ne estas *mia* kaj ne koncernas *min*.

Nun ni revenu al la unua supozo. Ĝi estas multfoje pli konsterna. Ni diru, ke nia eterna animo, restinta post la forpaso el nia korpo, tute identiĝas kun nia surtera personeco kaj kun nia memkonscio. Ĝi konservis post la morto de la korpo ĉiujn niajn sentojn kaj restis ligita al ĉio, kio foje estis al ni kara. Nun ni imagu: estante senkorpa animo mi vidos mian filon dum ploro nepovante lin konsoli, mi akompanos lin tra lia tuta vivo, ĉiumomente rigardos lin, ĉeestos dum liaj suferoj, malesperoj kaj danĝeroj, kiuj minacos lin, sen povo helpi lin, protekti kaj defendi lin. Kia doloriga sorto kaj kia kruela! Multe pli kruela ol ĉiuj suferoj de Geheno. La plena, senspura vivforpaso ja ŝajnas kiel feliĉego kompare kun *tia* ekzistodaŭro de animo povoparalizita sed kun konservita sentokapablo. En tiu ĉi kazo la animo restus senpova atestanto de la propraj kaj la mondaj doloroj, angoroj kaj suferoj, kiel katenito ŝlosfermita en kadro de sia eterneco, sen povo kontakti kun ĉiuj, kiujn ĝi amis eĉ pli ol sin mem.

Nun ni faru ankoraŭ unu paŝon antaŭen. Nia memo konsistas el certaj konscioj, ideoj kaj idealoj. La enhavo de nia interna vivo konsistas el la mondo al ni konata, el la tuto de la ĉirkaŭaj subjektoj kaj objektoj. Sed la eterneco estas treege longdaŭra. Ĉio, kion ni scias, konas, ŝatas kaj amas, ĉio, kio interesas nin kaj estas al ni kara, memkompreneble forpasos post kelkaj generacioj. Post kelkaj jarmiloj eble jam ne ekzistos plu nia nacio kun ĝia tuta kulturtrezoro. Kian intereson tiam havos mia animo por la mondo surtera? La animo tiam devos serĉi novajn, ne antaŭvideblajn aferojn. Sed tiam ĝi iom post iom perdos la antaŭan enhavon kaj akiros novan, ĝis ... ĝi iom post iom ĉesos prezenti min, mian nunan enhavon kaj mian nunan memon ...

Ne, ne! La individua animeterneco estas ne nur nekomprenebla. Ĝi estas eĉ nedezirinda. Multe pli bona estas la entuta porĉiama forpaso al absoluta neekzisto. Oni devas deziri nur tion, ke la morto venu ne tro frue kaj dolorige, ke ĝi venu ĝustatempe, kiam jam estas finita nia vivmisio kaj plenumitaj ĉiuj vivodevoj.

*Trad. J. Kohen-Cedek.*



# Homaranismo kaj etiko

De JAMES D. SAYERS.

Jam skribis al mi (ĝis majo, 1950) tiom multaj amikemaj, bonkoraj legantoj de *Invito al Ĉielo*, kiuj esence miskomprenis la libron, ke mi estas profunde dolorigita. Aŭ la kritikantoj ne emas serioze konsideri ideojn novajn al ili, aŭ ili tro rapide legis la vortojn. Eble ili devos estonte maĉadi la rapide legitajn vortojn por eltiri la pensigan nutraĵon kiel gebovoj unue rapide englutas herbaĵon por poste rukti kaj maĉadi ĝin.

Kredeble librolegantoj dividiĝas en du grupojn. La unua kategorio rapidege legas novan, pensigan libron kaj poste, se ili volas pli detale konsideri la enhavon, pensplene relegas la libron. La dua kategorio, al kiu mi apartenas, pli malrapide legas la unuan fojon iun libron, kiu prezentas novan scion aŭ novajn, stimulajn ideojn, ili estu prezentataj kiel pensindaj teorioj aŭ kiel jam science pruvitaj faktoj.

Kelkaj skribis nur por laŭdi, kaj inter tiuj estas du, kiuj konjektis, ke mi rakontis nur mistike pri la rasa evoluo kaj intermiksado. Eble ili pravis. Sed ili kaj la aliaj, kiuj malkonsentis, devus vidi la blankhaŭtan mumion nun en la Muzeo de Natur-Historio en Nov-Jorko kiun oni portis la lastan jaron de la antikva enterigejo en Peruo. Kiam mi, en mia unua etnologia verko "Ĉu la Blanka Raso Povos Daŭri?", eldonita 1929, deklaris ke ekzistas multaj pruvoj, ke la loĝantoj de la civilizita antikva Ameriko estis blankuloj, kaj ke ili malaperis per la intermiksado kun siaj nigraj sklavoj, multaj legantoj, eĉ sciencistoj, primokis min kiel fantazieman teoriulon. Ili ne klopodis science refuti miajn pruvojn. Nun venas la antikva blankhaŭtulo de Peruo por primoki miajn primokantojn.

Mi ne kolere respondis al la primokantoj de antaŭ dudek jaroj, kaj certe mi ne malestimas la miskomprenemajn kritikantojn de *Invito al Ĉielo*. Kiam iu homo havigas al si novan ideon, kiel faris Kristoforo Kolombo pri la rondeco de la terglobo, tiu homo devas esti preta ricevi la primokojn de tiuj homoj kies imag- kaj penspovoj multe mankas. Eĉ la Papo de Romo primokis kaj minacis per kondamno al morto Leonardo da Vinci pro lia teorio pri la rondeco de la terglobo.

Ĉio en la antaŭaj paragrafoj gvidas al la deklaro de mia kredo pri etiko. Kiam oni miskomprenas la romanon *Invito al Ĉielo* kaj akuzas min kiel malamanton de la tiel nomataj nigraj rasoj, mi nur volas respondi, ke ili mistrafis la plenan esencon de la libro, kiu esenco estas: Senescepta interhoma amo kaj helpemo. Kiel homamanto kaj kristano mi tute ne povas ekkoni ian diferencon rilate homrajtojn por iu homo ie ajn en la mondo. Pro tiu kredo mi unue fariĝis kristano, poste esperantisto kaj nun mond-federalisto. Mi volas fari mian plejeblon por garantii al ĉiu kunhomo la aliron al ĉiuj bonaĵoj de la terglobo, se li pretas fari sian kontribuon de kreiga laboro por havigi tiujn bonaĵojn.

Mi nur hazarde naskiĝis en la nova, riĉa lando de Nord-Ameriko. Nek mi, nek iuj aliaj el miaj samnacianoj kreis la naturajn riĉaĵojn de Ameriko, sed ni kontribuis nian komunan laboron por eltiri tiujn riĉaĵojn el la nova tero. Ni feliĉe, denove pro hazardo, naskiĝis gefiloj de prapatra rasa deveno, kiu emas esplori, konstrui, elpensi novajn inventojn por plibonigi la vivon. Ĉi tiu emo, kune kun la feliĉa kunligado kun nova, plej riĉe naturdotita kontinento, donis al mi kaj miaj samgeneracianoj en Ameriko pli da bonaĵoj ol ĝuas la longtempaj loĝantoj de Afriko aŭ Sud-Ameriko, malgraŭ tio ke sur tiuj kontinentoj estas naturriĉaĵoj certe egalaj, eble superaj al tiuj de Nord-Ameriko.

Sed ĉu ni en Nord-Ameriko fanfaronu pro nia hazarda feliĉo? Ĉu ni, ĉiu persone, kreis, unue, niajn prapatrojn, kaj, due, la naturajn riĉaĵojn de nia kontinento? Tute ne!

Kiam mi pripensas la malfeliĉajn, ofte malsategantajn loĝantojn de aziaj kaj aliaj malpli feliĉaj landoj, komparante ilian sorton kun mia sorto, mi memoras la diron de Oscar Wilde, kiam li rimarkis malpuran ĉifonulon sur londona strato: "Nur pro la graco de Dio ne iras tie Oscar Wilde."

Multaj homoj naskiĝas de la samaj gepatroj kun grandaj diferencoj laŭ naturdotaj kapabloj. Nek unu nek alia kreis sian internan, esencan emon al la vivovojoj, kiujn li poste sekvas. Tiu originala doto venis nek pro la elekto de la gepatroj, nek pro la energio aŭ manko da energio en la individua posedanto. Tiuj kiuj, hazarde, ricevas pli feliĉigajn dotojn, individue aŭ



pro la feliĉa naskiĝo en pli dotita mondparto, ne rajtas fanfaroni nek kondamni iamaniere siajn malpli feliĉajn kunhomojn.

Kontraŭe, tiuj kiuj hazarde ricevas pli riĉan doton devas plej profunde senti sian devon eltenadi helpeman manon al tiuj kunhomoj, kiuj estis, laŭ la hazardo de naskiĝo, ne tiel bonŝancaj.

Kredante plej profunde je la Dia Plano en la tiel mirakle regata Universo, de la plej eta ĝis la plej-ega, mi dankas al Dio por ĉia okazo helpi iujn kunhomojn, kiuj bezonas mian helpon. Mi sentas tiun devon ne nur en etaj, individuaj kazoj, sed mi sentas ĝin pli vaste, mondvaste. Tial mi estas esperantisto; tial mi estas mond-federalisto, strebante por ordigita mondo, sub forta, juste senpartia monda registaro kiu, laŭleĝe, garantios al ĉiu homo absolutan rajton al la persona libereco kaj al la plena valoro de sia laboro. La terglobo estas la dia doto al la homaro. Neniu parto de la homaro devas esti fiera en la kredo, ke Dio favoras speciale ĝin. La ŝajna speciala favoro estas nur provo. Estu ni indaj!

Rilate la malmultajn, kiuj kredis ke mi, pere de la roluloj en *Invito al Ĉielo,* kritikis aŭ kondamnis la katolikojn aŭ aliajn eklezianojn, mi nur volas mallonge respondi, kaj en la sama etika humoro.

La esence religia emo en la romkatolikanoj, luteranoj, metodistoj, hebroj aŭ aliaj homgrupoj, kiu fervore, sincere sekvas la biblian etikon de interhoma amo kaj tolero estas, miaopinie, ĉiam kaj ĉie aprobinda. Sed kie homoj havigas al si la povon kaj aĉrajton kondamni, eĉ al brulmorto, aliajn homojn, kiuj ne tute konsentas kun ili, mi kredas ke la Kontraŭulo de ĉio bona regas en ties koro. Multmiloj da homoj, kiuj sincere, plej pie, adoris Dion, sed ne konsentis doktrine kun povhavantaj episkopoj kaj papoj, estis korpe disŝirataj aŭ bruligataj ĝis morto.

La ekkono de tiaj historie nerefuteblaj okazoj ne kondamnas la sincerajn sekvantojn de tiu aŭ alia religia sekto, kies regantaj antaŭuloj malhonoris Dion kaj tiun sekton. Kontraŭe, se tiaj sekvantoj estas veraj homamantoj, veraj sekvantoj de la plej eminenta homamanto el ĉiuj, Jesuo Kristo, ili ne sentos

sin atakitaj, kiam oni aludas al pasintaj krimegoj, pri kiuj ili ne estas respondaj. Ili nur emos certigi, ke tiaj fiagoj neniam plu makulos ilian eklezion. Nur tiamaniere ni povos kune suprenrampi la Supran Vojon.

Ni esperantistoj, kiuj kredas kun Zamenhof je la Interna Ideo de homa frateco kaj laboras por efektivigi unuigitan homaron en harmonio, havas en niaj koroj etikon, kiu kreas en ni toleron kaj komprenemon al ĉiu kunhomo en la mondo. Eĉ se ni devos iam kontraŭbatali kunhomojn kiuj, blinde viktimigitaj de Malbono, penas forpreni de ni niajn esencajn homrajtojn, ni povas aspiri al pli dia karaktero per la ekzerco de nia pardonsento al tiuj kompatindaj viktimoj de malhoma, maldia instigado.

---

## Evangelisches Johannesstift en Berlin-Spandau.

De *HELLMUT OTTO*

Lasu nin ami ne per vortoj kaj la lango, sed per la faro kaj per la vereco.

I Joh. 3: 18.

La supran sentencon donis Johann Hinrich Wichern al "Evangelisches Johannesstift", kiam li 1858 fondis ĝin en Berlino. Pelata de tiu amo li laboris en la disfalanta mondo de tiu epoko. Li vidis ne nur la mizeron de sia tempo sed ankaŭ ĝiajn kaŭzojn kaj la malhelajn ombrojn super la estonto de sia popolo. Tiel li fariĝis profeto, kiu restis ne ĉe teorioj sed mem agis kaj influis aliajn, de la plej simplaj ĝis la plej altaj.

Per Johannesstift Wichern volis en la evangelia eklezio krei institucion, kiu helpu al morale minacataj kaj faletintaj homoj trovi novan vivon. Precipe la malhumanaj cirkonstancoj en la malliberejoj vokis al rapida kaj forta helpo. Li vidis en tiuj cirkonstancoj ne nur mankon de organizo sed antaŭ ĉio kulpon de la socio kaj preterlason de la eklezio. La krimuloj estis por li abomenaĵo sed la malhumane laboranta administracia aparato preskaŭ ankoraŭ pli. Laŭ li estis sankta devo de la eklezio kristane zorgi por krimuloj en la malliberejoj kaj por punitoj.

Por tio li bezonis helpantojn, "fratojn" li nomis ilin, kiuj perfektiĝu en Johannesstift. Jam la nomo atestu pri tiu amo, kiu aperis en Kristo, kiu manifestiĝas per faroj kaj donas eĉ la vivon por la fratoj.

Tiel komenciĝis. La fratoj de Johannesstift zorgis por krimuloj en la malliberejoj kaj por iliaj familioj. Ili klopodis por repaciĝo inter malliberuloj kaj iliaj familioj. Ili loĝigis iliajn infanojn en la propra edukejo, kiu estis kreita por doni novan hejmon al sengepatraj infanoj el la mizero de la grandurbo. Ili laborigis ekskrimulojn ĉe kapablaj metimastroj, zorgante por la unuaj necesaj vestoj kaj laboriloj.

Reformi tute la malliberejojn oni tamen ne sukcesis pro la indiferento de la administrantoj kaj pro la kontraŭstaro de la prusa parlamento, kiu rifuzis kristanan influon en la ŝtataj malliberejoj.

Malgraŭ tio Johannesstift de sia malriĉa komenco, tra danĝeraj mizeroj kaj krizaj situacioj, evoluis ĝis sia nuna amplekso.

Ĝi troviĝis apud la grandaj akvostratoj kaj ĉe la fervojo. La loko de Johannesstift estis la plej bona por konstrui la berlinan urbhavenon, kaj oni devis cedi ĝin. En 1907—1910 oni laŭ grandstila plano tute novkonstruis Johannesstift en la urbarbaro de Berlin-Spandau.

La tuta areo ampleksas 75 hektarojn. Ĝi troviĝas ĉe la rando de la urbo, tamen kun arbaro ĉiuflanke. De malproksime oni vidas la preĝejon, kiu estas la mezpunkto de la institucio. Vizitantoj el la bombdetruita urbo aŭ el la vasta kamparo nomas Johannesstift verda insulo aŭ insulo de paco. Fakte ĝi estas malgranda regno de paco, en kiu regas la amo de Dio. Proksimume 1250 homoj, flegatoj, lernantoj kaj kunlaborantoj vivas tie.

La esenca spirito kaj celado de Johannesstift estas donitaj ĉeftrajte en la komenco de tiu ĉi artikolo. La evangelio de Jesuo Kristo donas bazon, spiriton kaj celon al la laboro. En la parabolo pri la perdita filo oni vidas sian rilaton al Dio, en tiu

de la kompatema samariano sian rilaton al la kunhomoj.

La nunaj taskoj de Johannesstift estas perfektigo de junaj homoj por ekleziaj kaj sociaj-humanecaj servoj, edukado de morale minacataj infanoj kaj gejunuloj, flego de malsanaj, malsanemaj kaj kriplaj homoj. Krome ĝi servas kiel ejo de kunvenoj kaj libertempado al diversaj ekleziaj laborrondoj, precipe la evangelia junularo kaj la popolmisio (renkontokunvenoj de rifuĝintoj, revenintoj k. a.).

El ĉiuj taskoj la flego de gemaljunuloj estas la plej ampleksa. Estas flegataj tie 370 malfortaj kaj malsanemaj gemaljunuloj. Sed tio neniel sufiĉas. Sole en Berlino ekzistas inter la 3,3 milionoj da loĝantoj pli ol duona miliono da homoj, kiuj estas pli ol 60jaraj. Tre multaj el ili ne povas pluvivi sen flego. Ekzistas en Berlino nur 47 evangeliaj hejmoj kun ĉirkaŭ 2.400 litoj. Tio montras, kiom da helpo ankoraŭ estas necesa.

La dua granda tasko estas eduko kaj instruo al morale minacataj infanoj kaj gejunuloj kaj al duon- aŭ plenorfoj, kiuj ne havas ĝustan edukon. Por tiu celo laboris Wichern de la komenco. Li pensis, ke gejunuloj malmoraliĝas pro senmoraleco en la familio, kaj tio gvidis lin al lia propra familisistemo.

Ĉirkaŭ 12 junuloj estas kunigitaj sub "frato" kiel en familio, en kiu efikas la moralaj kaj religiaj fortoj de kristana ordo. Tie regas ne la principo de puno sed tiu de helpo. Wichern skribis mem:

"La spirito de la Kristokredo estu la spirito de la domo. Per tiu spirito kaj la same afabla kiel grava, savon alportanta amo ni volas ĉirkaŭpreni ĉiun unuopan infanon. Kaj ĉu ni povas tion pli bone fari ol per la ĝojigaj kaj liberigaj vortoj: "Mia infano, ĉio estas al vi pardonita! Rigardu ĉirkaŭ vi, en kia domo vi estas akceptata! Tie ĉi estas neniu muro, neniu foso, neniu seruro; nur per peza ĉeno ni ligas vin, se vi volas aŭ ne, se vi volas disŝiri ĝin aŭ ne. Tiu ĉeno nomiĝas amo, kaj ĝia mezurilo estas pacienco. Tion ni donas al vi, kaj tio, kion ni postulas, estas ĝuste tio, per kio ni volas helpi al vi, nome ke vi ŝanĝos vian menson kaj de nun ekzercos dankeman amon al Dio kaj homoj."

En tiu spirito estas edukataj en iuj domoj 70 geknaboj kaj en alia 80 junuloj. La junuloj laboras tage en vasta agrokulturo, en ĝardenoj kaj parko. Tiuj, kiuj volas lerni certan profesion, estas okupitaj en diversaj laborejoj, eks. lignajejo, ferajejo, elektrajejo, pentrejo, bakejo k. a. aŭ ĉe kapablaj metimastroj ekster Johannesstift.



Krom tio estis pasintjare aranĝita speciala hejmo por metilernantoj, kiu komencis funkcii kun 17 junuloj, kiuj venas el rifuĝintaj familioj aŭ estas senpatraj.


Sed kiom restas por fari! Timige alta estas la nombro de morale minacataj gejunuloj en Berlino, kiuj laŭ homa kompreno povus esti regvidataj en ĝustan vivon per enordigo en iu hejmo sub sperta gvido. Laŭ oficaj sciigoj estis en 1948 juĝataj ĉe juĝejoj 8.000—10.000 gejunuloj. Sed ekzistas nur malmultaj lokoj por helpi ilin. Johannesstift havas cetere unu el la malmultaj hejmoj por perfektigo de metilernantoj. En la gejunula eduko troviĝas nepre solvotaj problemoj kaj taskoj por ŝtato kaj eklezio, kun granda signifo por la renaskiĝo de nia popolo en la eŭropa popolfamilio.

Sennombraj, neprizorgataj kripluloj atendas bonan flegadon. Du domoj en Johannesstift kun entute 76 litoj estas la solaj hejmoj en Berlino por mense normalaj kripluloj.

En grupo de tiaj kriplaj junuloj, kiuj grandparte estas daŭre katenitaj al la lito aŭ la veturilo, kelkaj pro kriplaj manoj ne povas eĉ skribi, mi komencis esperantokurson por instigi ilin, formi ilin lingve kaj vastigi ilian rigardon al la mondo kaj aliaj homoj. Suprizis min la entuziasmo, per kiu tiuj plej kompatindaj junaj homoj partoprenas la instruon kaj kiel ilia parte mirinde vigla menso penetras en tiun ĉi novlandon, kaj precipe ilia dankemo pro la interparolado.

De la ceteraj aranĝoj de Johannesstift estas menciinda plue la preĝeja muziklernejo, per kiu ĝi havas en tiu fako gvidantan pozicion. Inter aliaj laboras tie profesoro Pepping, unu el la plej famaj komponistoj de la nuntempa Germanujo. Pasintjare li tre distingiĝis per sia latina meso "Dona nobis pacem" (Donu al ni pacon), kiu kelkfoje per radio estis dissendata al la mondo.

Mi menciu ankaŭ la "Matthias-Claudius-hejmon", kiu pasintjare estis aranĝata kiel gastejo. Kun siaj belaj, agrablaj ĉambroj kaj 46 litoj ĝi staras preta por akcepti multnombrajn



*Evangelisches Johannesstift*

gastojn, precipe gejunulojn, dum kunvenoj kaj libertempoj. Estas tre ĝojige, ke precipe la senkonsila, serĉanta junularo de la grandurbo tiel havas lokon por meditado, por spirita refreŝiĝo kaj korpa fortiĝo.

En tiu hejmo okazas ankaŭ la libertempoj kaj prepartempoj de la propraj kunlaborantoj. Tiam oni konatigas al ili la precipan laboron de la Interna Misio kaj montras al ili la vojon al Kristo, en kies nomo kaj komisio la laboro okazas. Dum kelkaj tagoj la kunlaborantoj vivas kune laŭ eklezia ordo. Estas surprize, kiel necesa estas tia "Interna Misio" al la propraj kunuloj, kiel liberaj kaj dankaj fariĝas junaj kaj muljunaj, se tiaj demandoj de la vivo estas priparolataj kun ili kaj montrata al ili bona vojo.

La duona areo de Johannesstift estas uzata por agrokulturo. Kampoj kun greno, terpomoj, legomoj ktp estas intense kulturaj. Troviĝas granda portebla tubaro por akvi la kampojn kaj tiel akiri de la malpeza, sabla tero kiel eble plej grandajn rikoltojn. Krome ekzistas 5 hektaroj da ĝardeno kun legomoj kaj fruktarboj. Dum la treege malbona situacio post la milito tiu propra produktado de nutraĵoj estis tre valora. Pro ĝi oni ankaŭ pli facile travivis la blokadon.

Dank' al Dio mirinde konserviĝis Johannesstift en la milita kaj postmilita tempo. La katastrofo certe ne preteriris ĝin, sed ĝi restis kaj ekzistas. La eksterajn difektojn oni povis grandparte ripari, per subvencioj de multaj flankoj. La multnombrajn ĉambrodifektojn oni riparis, almenaŭ provizore. Oni renovigis almenaŭ ĉiujn eksterajn fenestrojn, por kio estis bezonataj pli ol 4.000 vitroj. La kampoj dum la milito fariĝis neuzeblaj pro aviadilkanonoj, sed nun ili estas repacigitaj por sia natura uzo. La brutaro, tute ekstermita de la rusoj, estas renovigita. La laborejoj funkcias. La entrepreno laboras.

Malgraŭ tiu evoluo Johannesstift de kelka tempo troviĝas en grava krizo, kiun kaŭzis la duobla valutreformo. Je la unua reformo, 24/6 1948, ĝi perdis la tutan kapitalon, por kiu ne estis donata ia kompenso. Estas facile kompreni, kion tio signifas por tiom granda entrepreno. Krom tio daŭre okazis perdoj pro la duobla valuto en Berlino. En okcidenta Berlino la orientmono validis por enportitaj varoj (nutraĵoj ktp) kaj por oficaj

pagoj, sed por ĉiuj liberaj varoj estis postulata okcidentmono. ekz. por tolaĵoj. Salajroj estis pagataj je unu kvarono per okcidenta mono kaj je tri kvaronoj per orienta. Dum Johannesstift ĉefe enspezis orientmonon, ĝi devis pagi unu trionon en okcidentmono kaj tio ĉe valutrilato inter okcidenta kaj orienta mono kiel 1: 4 (nun eĉ 1: 7).

La financa situacio ankoraŭ pli malboniĝis, kiam pro la dua valutreformo de 20/3 1949 la okcidentmarko estis deklarata sola mono en okcidenta Berlino. Ĉiuj flegatoj kaj lernantoj el la orienta zono, kaj ĝuste por ili Johannesstift estas mezpunkto kaj edukejo, povas pagi nur per orientmono, sed Johannesstift mem devas pagi per okcidentmono. Sed memkompreneble oni ne malakceptas aŭ forigas la homojn. Tiel Johannesstift finis la pasintan jaron kun manko de 76.000 okcidentmarkoj.

Estas malfacile diri, kiel tiu situacio iam estos ve..kita. Certa estas nur tio, ke Johannesstift ne povas ĉesigi sian laboron kaj en la nuna granda mizero ankaŭ ne povas limigi ĝin. Ĝi fidas al la dia helpo kaj esperas, ke venos helpo kaj novaj eblecoj.

En tiu ĉi spirito la evangelia Johannesstift devas resti, kiel diris je la 90a jarfesto ĝia estro, pastro Eckstein, tia kia ĝi estas laŭ la volo de la fondinto:

*verko kaj ilo de la kompatema amo de Dio.*

---

## Kometoj kaj aerolitoj, vaguloj en la universo.

De K. WILGENHOF.

Ĝi flugadas tra la spaco. Senĉese, tagon post tago, jaron post jaro. Kelkdekojn da kilometroj en ĉiu sekundo. Nur malrapide kurbiĝas ĝia vojo.

Antaŭ pluraj jaroj ĝi pasis planedon, al kiu ĝi nun denove proksimiĝas, kaj kiun ties plej raciaj estuloj nomas *la tero.* El la miliardoj da teranoj nur kelkmil atendas ĝin, sed baldaŭ milionoj turnos siajn okulojn al la ĉielo por rigardi imponan fenomenon.

Estas nokto, serena nokto kun klara ĉielo. La stela regno



montras sin en plena majesto. Ie inter la steloj luma aperaĵo vidiĝas; en ĝia mezo hela kerno kaj ĉirkaŭ ĝi lumaj flagroj. De la centra helaĵo kelkaj longaj lumstrioj etendiĝas, ĉiuj en sama direkto kvazaŭ larĝa vosto. Tio estas *kometo.* Neofte okazas, ke kometo vidigas sin. Kiam tia astro estas je okulvida distanco de la tero, la spektaklo restas videbla dum multaj semajnoj.

En longe pasinta tempo la homaro tre maltrankviliĝis ĉe apero de kometoj. Oni rigardis ilin kiel ĉielajn anoncantojn de mizero kaj puno. Predikistoj uzis la fenomenon por admoni homojn virtiĝi pro la dia signo. Post kiam astronomoj studis la kometojn kaj klarigis iliajn aperojn, tiu timo malaperis.

Dum la 17a jarcento oni diligente esploris la kometaperojn. El la faritaj observoj oni povis konkludi, ke kometoj rondiras en la universo laŭ iaj kurboj. Angla astronomo Halley (1656—1742) eltrovis, ke la kometoj aperintaj en la jaroj 1531, 1607 kaj 1682 moviĝis laŭ samaj kurboj kaj aperis post intertempoj de 75 aŭ 76 jaroj. Li konkludis, ke la tri kometoj en vero estas unu, kiu periode revenas al la proksimo de la tero kaj ĉiam ŝvebas laŭ certa orbito.[1]

Tial li anoncis, ke ĝi reaperos en 1759, kio efektive okazis. Poste oni esploris antikvajn historiajn dokumentojn kaj trovis konigojn pri ĉiuj aperoj de tiu kometo komence de 87 a. Kr. Supozinde la kometo de Halley estis la ĉielsigno, kiu teruris la homojn en la jaro de la detruo de Jerusalemo (66). En 1985 ni povas atendi ĝian sekvan revenon.

Ankaŭ aliaj kometoj tiel rondiras, kaj evidentiĝis, ke kometaj orbitoj estas elipsoj. La suno estas unu el la fokusoj. Per tio ili similas al planedoj, sed ties orbitoj estas preskaŭ cirklaj. Kelkaj kometoj iras laŭ orbitoj tiom longaj, ke jardekoj pasas, antaŭ ol ili plenumis unu rondiron ĉirkaŭ la suno.

Kometoj estas treege grandaj. Tamen pro la ekstrema maldenso de ilia materio ili estas ankaŭ tre malpezaj. Tiom maldensaj ili estas, ke oni neniam konstatis iun gravitan influon al planedo, en kies ĉirkaŭaĵo ili venis. Ĉiam ĉe tia kazo la

---

1) Orbito estas kurba linio, kiun planedo aŭ kometo laŭiras ĉirkaŭ la suno.

kometo estis la "viktimo" kaj ŝanĝiĝis laŭ direkto; la planedo restis senŝanĝa.

Malantaŭ kometo etendiĝas granda amaso da materio, la famiga vosto de kometo. Ĝi povas atingi longon, kiu egalas 10.000 diametrojn de la tero; ĉe kelkaj kometoj ili nombriĝas eĉ centmilionojn da kilometroj.

Denove estas klarĉiela nokto. Sed ne la ordinaran kviete lumetantan stelaron ni vidas. La paca harmonio sur la ĉielo elordiĝis, kvazaŭ malbonintenca bando invadis la stelan regnon. Brilaj punktoj jetiĝas tra la firmamento. Ili kelkfoje estiĝas lumstriojn, kiuj daŭras sekundon aŭ iom pli kaj poste estingiĝas. Ĉien kaj senhalte sagas la ĉielaj fajreroj. Oni nomas ilin falsteloj aŭ pli science *aerolitoj*.

Tia spektaklo estas malofta fenomeno, ĉar amasaj falstelaroj nur kelkfoje en jaro okazas, kaj pro veteraj cirkonstancoj ili ne ĉiam estas bone videblaj.

La nomo *falsteloj* ne estas vere taŭga, ĉar aerolitoj ne estas falantaj steloj, sed ferŝtonoj, kiuj traflugas la spacon de nia planedosistemo kaj foje venas en la teran atmosferon. Ankaŭ ili ŝvebas en elipsaj orbitoj kaj plejofte en grandaj amasoj, tiel ke ĉie en la orbito troviĝas aerolitoj. Se la tero trairas orbiton de aerolitaro, ni povas nokte vidi multajn falstelojn; dum taglumo la aerolitaj lumstrioj ne estas videblaj.

Aerolitoj, kiuj flugas tra la atmosfero estas mem ne videblaj, ĉar ili estas tre malgrandaj — ofte kun nur unu — aŭ ducentimetra diametro — kaj tre altaj — proksimume cent kilometrojn. Nur lumstriojn ni povas vidi. Tiu lumo estiĝas en la intense kunpremataj aeromolekuloj antaŭ la rapideganta aerolito — ekzemple 60 km en unu sekundo. La arda strio baldaŭ malaperas, plejofte post malpli ol unu sekundo, sed en esceptaj kazoj ĝi daŭras kelkajn sekundojn.

Kvankam aerolito tre ofte estas tiom malgranda kiom pizo, ĝia grando kelkfoje estas kiel homa pugno. En 1908 en Siberio — bonŝance en senhoma regiono — falis aerolito tiom granda, ke sur areo de 250 km² ĉiuj arboj renversiĝis pro la fortega aerdispuŝiĝo. Pluraj meteorologiaj observejoj en la mondo registris grundvibron, kiu sekvis post la batego kontraŭ la tersurfaco.



En Arizona (Usono) oni konas krateron, kiun aerolitego frapis en la grundo en pratempo. La kratero estas profunda 174 m. Ĝia diametro estas 1.200 m. La kolosa aerolito tiom profunde penetris en la teron, ke oni ankoraŭ ne trovis ĝin. Inter la ĉirkaŭloĝantaj indiĝenoj ankoraŭ vivas la mito pri fajrodio, kiu alflugis el la ĉielo.

La plej granda trovita aerolito iam falis apud la loko, kie nun Bloemfontein (Suda Afriko) situas. Ĝi pezas 60 tunojn.

Por distingi aferojn oni donas al ili nomojn. Tiel ankaŭ al aerolitaroj. Oni rimarkis, kiam fluo de aerolitoj vidiĝas sur la ĉielo, ke ili evidente ĉiuj eliras el unu loko de la firmamento. Pro tio oni nomas la koncernajn aerolitarojn laŭ la nomo de la stelaro, kie la t. n. radia centro troviĝas. Tiel oni konas ekz. Leonidojn, kiuj iras el la stelaro Leono, Perseidojn el Perseŭs, Orionidojn el Oriono. La radia centro de Drakidoj troviĝas en la kapo de la stelaro Drako. Tiel — nederlanda astronomo Wanders rimarkigis — Drako almenaŭ unufoje dum sia longa ekzisto vere vomis fajron, kio ja konvenas al bonkonduta drako.

Tamen la elradia loko ne estas reala, sed perspektiva. Same kiel du reloj de fervojo ŝajne kuniĝas ĉe la horizonto, tiel ankaŭ la aerolitaj vojoj kvazaŭ originas en unu centro. En realo ĉiuj aerolitoj paralele iras kaj la radia centro konigas la devendirekton.

En 1866 itala stelsciencisto Schiaparelli eltrovis ion rimarkindan. El liaj kalkuloj montriĝis, ke la orbito de la perseidaj aerolitoj estas identa kun la kurbo, kiun trairas kometo vidita en 1862. Post kelka tempo oni konstatis laŭ kalkuloj de la astronomo Leverrier, ke alia kometo ĉiam troviĝas en la vojo de Leonidoj. Kaj kiam io sama koniĝis pri tria kometo kaj Andromedidoj, la supozo, ke tio estas hazardaj koincidoj, ne povis resti. Kompreneble oni de tiam konjektis, ke ĉiuj aerolitaj svarmoj estas ligitaj al iu kometo iranta aŭ irinta laŭ la sama vojo.

Oni supozas, ke kometa kerno konsistas el granda amaso da gruzo. La gruzeroj estas diversaj laŭ grandoj kaj pezoj. Pro tio ankaŭ iliaj rapidecoj diferencas. Do dum paso de jarmiloj multaj pli kaj pli malantaŭiĝis post la kerno kaj fine

ĉie en la orbito troviĝas gruzeroj, ĉi tie multaj kaj tie mal-multaj. Kaj tiuj estas aerolitoj, kiujn ni povas vidi, kiam ili trairas la ĉirkaŭteran aertavolon.

Car aerolitaj svarmoj flugas laŭ elipsaj vojoj, ili revenas je regulaj tempoj. Almenaŭ se ne okazas io, kion kelkaj spertis. Leonidoj, kies riĉan fajradon oni vidis en 1799, 1833 kaj 1866 neatendite restis for en 1899. Ankaŭ en la sekva jaro ĝi ne revenis. Kiel aerolitaro povas tiel subite malaperi? Leonidoj ne tute perdiĝis. En 1901 ĝi tamen montris sin; ankaŭ denove en 1932, sed ĝi multe perdis laŭ nombro kaj vidindeco. Post kelka esplorado klariĝis, ke la planedo Jupiter estas kulpa pri tiu malpliiĝo. Laŭ astronomiaj kalkuloj la aerolita svarmo en 1898 tiom proksimiĝis al tiu planedo, ke ties gravita forto ŝanĝis ĝian direkton. De tiu tempo Leonidoj iras laŭ alia orbito kaj perdiĝis kiel vidinda spektaklo por la loĝantoj de la tero. Jupiter akiris ioman famon kiel "kaptanto" de aerolitaroj kaj kometoj.

Lastatempe oni traserĉis la ĉielon per radaraparatoj. Tio ebligas "vidi" aerolitojn ankaŭ tage. Per radarsendilo mal-longaj elektromagnetaj ondoj estas direktataj supren. Aero-litoj, kiuj traflugas nian atmosferon, estigas elektronplenajn striojn en la aero. Tiuj strioj resendas la ondojn kaj la rice-vata radioeĥo registriĝas.

La rezulto de tiu nova apliko de radartekniko estis sur-priza. Ĉiujare en la somero la tero iras tra aerolitan svarm-on, pri kiu ĝis nelonge oni supozis, ke ĝi daŭras nur semajnon. En somero 1947 brita astronomia grupo en observejo Jodrell Bank (Anglujo) esploris la svarmon per radarinstalaĵo, kaj tiam montriĝis, ke ĝi estas tre riĉa je aerolitoj kaj ke ĝi daŭras dum la tuta somero. Oni registris 20 ĝis 80 aerolitojn en ĉiu horo. Ankaŭ en 1948 oni konstatis la samon. Car la observita svarmo ĉiam proksimiĝis al la tero ĉe la tagluma flanko, oni neniam antaŭe povis scii tion. Supozeble dum miloj da jaroj la tero ĉiusomere ŝvebis inter dekmiloj da aerolitoj sen homa scio pri tiu fakto.

—



# Komentoj.

*Kial la malfacilaĵoj?*

Kiam mi ricevis MR nro 1/1950, mi estis subskribinta rezolu-cion sendotan al la registaro de la Germana Demokrata Res-publiko, kiu jus ricevis de la Soveta Militista Administracio la rajton kontroli la klubojn kaj unuiĝojn. La rezolucio postu-las, ke la esperantistaro en nia respubliko ricevu la rajton labori por nia granda ideo.

Multaj germanoj mire legis la malpermeson de nia movado kaj ne estis certaj pri la veraj kaŭzoj. Ankaŭ en MR nur parto de la kaŭzoj de la malpermeso estas citita. La aliajn kaj ĉefajn kaŭzojn oni prisilentis, sed ili estas la plej gravaj. Koncize dirite: Esperanto fariĝis armilo en la "malvarma milito". Esperanto estis kaj estas misuzata por semi malpacon inter la nacioj. Esperanto, kreita por interpacigi la popolojn, ŝajnas al kelkaj (ne estas multaj) rimedo por ataki iliajn politikajn kontraŭulojn. En nian landon regule enflirtas pro-pagandafolioj de partio, kiu en sia lando estas tute malgrava kaj kiu raportas al ni, ke ni malsatas kaj fartas malbone, ke nur liberigo de la bolŝevismo povas garantii al ni bonan vivon. El tiuj flugfolioj en esperanto kaj en nia nacia lingvo ni eks-cias, ke ni estas bedaŭrindaj. Oni povus priridi tiajn agojn. Sed ili havas tre malbonajn sekvojn. Nia organizo estas malpermes-ita, sed ankoraŭ ne la apliko de nia kara lingvo. Eĉ la nova himno de nia juna respubliko estis kun permeso de la registaro esperantigita. Jen pruvo, ke la malpermeso celas ne esperanton sed la misuzon de esperanto.

En la civila vivo ne decas, ke oni nomas homon ŝtelisto aŭ mensogulo. Ankaŭ ne decas kritiki aliajn naciojn. Certe tiu partio, kiu en sia lando ludas nur malgravan rolon, havus kaŭ-zon ankaŭ en sia lando proponi reformojn kaj plibonigojn, sed tie ĉio ŝajnas en ordo. Do esperantoservo povas ŝajnigi al manpleno da homoj mondvastan signifon.

Stellan Engholm pravas, ke esperanto taŭgas por interami-kigi homojn diversnaciajn, por konatigi al ni fremdajn popo-lojn kaj iliajn kulturojn. Sed estas krimo kontraŭ la eterna ideo de esperanto semi malpacon per nia kara lingvo. Nur memkon-

trolo povas helpi. Ni zorgu, ke nia gazetaro estu libera de kurĉaso kontraŭ aliaj nacioj. Mi estas certa, ke la cirkonstancoj en Hispanujo kaj Portugalujo estas similaj. Nur estas verŝajne tie la kontraŭa ideologio, kiu volas influi la publikan vivon. Ne povas esti tasko de la esperantomovado enmiksiĝi en la politikon de aliaj landoj. Laŭ angla proverbo ĉiu familio havas skeleton en la ŝranko. Mia opinio: Ĉiu purigu siajn proprajn ŝuojn.

*R. Zimmermann.*

*Red rimarkigo.*

Ricevinte la supran komenton al mia artikoleto en nro 1/50 (Kie oni malhelpas esperanton), mi petis de la aŭtoro specimenojn de tiaj menciitaj flugfolioj kaj kondiĉigis, ke partio kaj persono menciitaj en la letero de Zimmermann, kiu akompanis la skribaĵon, estu menciataj kune kun apero de la komento. Cirkulerojn (kaj leterojn) mi ricevis. La aludita partio estas Socialist Labor Party en Usono. Leteroj kaj cirkulerleteroj venis ankaŭ de SAT-ano 1307 Weder, New York.

La cirkuleroj kaj leteroj kritikas rekte kaj forte la stalinismon, la staton en la orienta zono kaj la mankon de aktiveco ĉe la germanoj en tiu zono. La esprimo de Zimmermann, ke "esperanto fariĝis armilo en la 'malvarma milito' " ne povas signifi, ke la cirkuleroj kaj leteroj servas la oficialan usonan politikon. Citaĵo: "Ni atakas la usonan kapitalismon tiel same kiel la rusan ŝtatdespotismon, ĉar ambaŭ estas tiel similaj kiel unu ovo al alia." Sekve temas pri tria parto, kiu miksas sin en la malvarman militon. Weder skribas en unu letero;" Mi spekulacias, ĉu la popolo de la "poetoj kaj pensuloj" povas lerni ion el la eksterlando, ekzemple el Usono, *sen alpreni la ideojn de la usona reganta klaso. Ĉu ili povas lerni ion el la spertoj de la usona laborista movado, kiu certe iris malsimilan vojon* k akiris tre valorajn spertojn laŭ mia kompren- kaj komparkapablo. — Ĉiuokaze mi volas provi instruadon pri usonaj laboristmovadaj spertoj, k mi esperas trovi vin inter miaj aŭskultantoj k la legantoj de la cirkuleroj aŭ literaturo, kiun mi dissendos." Kaj aliloke: "Ĉu mi devas ree emfazi, ke via komprenemo estas necesa por ke vi gajnu el nia reciproka korespondado k por ke vi ekvidu lumon por via estonta vojo for el mizero ĉirkaŭanta vin k la viaj."

Ĉar Socialist Labor Party, (Esperanto Committee), kaj Weder estas tiel bone informitaj pri la stato en la orienta zono, ili devus konkludi, ke ilia propagando povas kaŭzi al la orientzonaj germanoj nur persekutadon, malpermesojn kaj ev. estonte eĉ malebligon de interkomuniko kun eksterlando.

*S. Engholm.*

*Kiel logi la anojn al niaj klubkunvenoj?*

> Esperantomovadaj demandoj ne apartenas al la temosfero de MR, sed ĉar tiu ĉi temo antaŭe estas tuŝita, estu loko ankaŭ por la sekvanta artikolo.

En iu el la numeroj de "Malgranda Revuo" nia samideanino G. Tistad tuŝis la diskuttemon "Kiel ni logu la anojn al la kunvenoj". G. T. opinias, ke ni ne per festoj provu logi la anojn, ĉar tute ne eblas al la esperantokluboj konkuri kun junulaj aŭ politikaj societoj, kiuj pli bone kapablas aranĝi tiajn kunvenojn. Estus vane konkuri kun ili. Krome ŝi skribas, ke "niaj viglaj esperantistoj jam havas sufiĉe da laboro pro kursgvidado, korespondo, estraraj taskoj. Restas malmulte da tempo por aranĝi festojn.

Laŭ G. T. ne decas logi la homojn per nura amuzado. Nia movado ne estas tia. Ŝi opinias, ke tiu ano pravas, kiu diris: "Ni devas serĉi aliajn vojojn. Ni donu al la homoj tion, kion ili ne povas trovi aliloke". Sed, sed ... kiom da esperantistoj, almenaŭ en nia urbo, havas ion por doni aŭ komprenas kiel doni? La stato estas tia, ke la kursgvidantoj ne volonte invitas la kursanojn al niaj klubkunvenoj. Ili hontas. Jes, mi kredas tion, kaj ili pravas laŭ mi".

Kion diri pri la ĉi supre mallume pentrita bildo de la stato en niaj esperantokluboj? Ĉu G. T. vere pravas? Jes kaj ne. Ĉar kvankam ankaŭ mi mem ofte estas pesimisto pro la malvigleco, kiu regas en certaj lokoj de Esperantujo, mi ĉifoje ne tute samopinias kun nia plendema samideanino! En niaj esperantokluboj ni havas multajn eblecojn, kiujn ne disponas aliaj societoj, kvankam ili kvante superas la niajn. Kaj kial ni ne aranĝu la esperantokunvenojn en formo de festoj? Kial ne

decas al ni logi la anojn al la kunvenoj per festaj programoj kaj mondaj plezuroj? Se ni deziras konservi la intereson de niaj anoj, ni aranĝu kunvenojn, kiuj entuziasmigas kaj igas la anojn sopiri al la venonta kunveno. Ni ja interalie provas logi la junularon al nia movado, kaj pro tio ni ne estu blindaj antaŭ ilia emo kaj postulo je amuziĝo: Aranĝante "sekajn" kunvenojn ni sendube forpelas ilin, kaj restas poste nur la anaro, kiu pro idealista motivo aliĝis al nia movado.

La plej malfacila problemo certe estas elpensi kaj variigi la programojn. La saman opinion havas ankaŭ G. T., ĉar ŝi skribas: "Kiom da esperantistoj ... havas ion por doni aŭ komprenas kiel doni?" Jen estas la problemo, kiun ni nepre solvu! Persone mi ne volas kredi, ke inter la esperantistoj ne troviĝas talentaj anoj, kiuj havas kapablon diversmaniere amuzi la ceterajn anojn, ekz. per muziko, kanto aŭ prelegoj. La plej grava tasko de la estraranoj do estu inventi kaj malkaŝi "kaŝitajn" talentojn en la grupo! Komprenenble ne nur la estraranoj kunagu en la programoj, sed ĉiu ano havas la saman devon alporti sian brikon por fari la kunvenojn interesaj kaj amuzaj.

Niaj monatkunvenoj prefere havu formon de amuzkunvenoj, kie ni havigu la entuziasmon, kiun ni bezonas por la ofte tre teda organizlaboro inter la kunvenoj! La monataj kunsidoj ne konsistigu iujn studvesperojn, kie ni dediĉas nin al lingvaj studoj kaj gramatikaj problemoj. Ne, tion ni rezervu por la studrondaj kunsidoj, kie estas la ĝusta loko por tiaj pli seriozaj aferoj. Nur en formo de lingvaj "kvaronhoroj" tiu punkto estu permesata. Tamen ni ne simile al iu esperantoklubo faru la decidon, ke ni ne parolu esperanton dum la kunsidoj. Ne, en niaj kunsidoj Esperanto estu la ĉefa lingvo! Sed ni ne malpermesu al iu kunaganto en la programo uzi la nacian lingvon, se li aŭ ŝi ne kapablas prezenti ĝin esperante.

Kion la programoj nun entenu? Persone mi havas multajn proponojn, sed bedaŭrinde ili ne konvenas en ĉiu klubo, ĉar mi pensas precipe pri tiu kategorio de esperantistoj, kiuj laŭ G. T. nek emas legi nek korespondi. La kategorion de anoj, al kiu G. T. mem apartenas, ne estas malfacile kontentigi. Ŝi skribas, ke ŝi mem ne havas bezonon de festoj sed prefere sin



dediĉas al amika korespondado, lingvostudoj kaj legado. Jen la ideala tipo de esperantistoj, sed bedaŭrinde tre malofta!

Sed kion ni faru por kontentigi la alian kategorion, kiu nek emas skribi nek korespondi? Ĉu tiaj personoj indas esti anoj de niaj kluboj? Por konservi nian scion de la lingvo ni ja nepre devas legi kaj skribi? La demando estas, ĉu ni ne enkonduku pli severajn regulojn por aliĝo al niaj kluboj. Ni pli atentu la kvaliton ol la kvanton de niaj grupoj! Ĉu ni ne enkonduku la regulon, ke neniu aliĝu al esperantogrupo, kiu ne partoprenis dujaran kurson en Esperanto? Ĉiu ano komprenu almenaŭ la ĉefan enhavon de la paroladoj, per kiuj ni kelkfoje amuzas la anojn! Ideala solvo estas, ke ni postulas almenaŭ la trapason de elementa ekzameno antaŭ aliĝo al niaj grupoj. Ĉu mi eble postulas tro multe?

Pro la limigita spaco de la gazeto mi ne volas fari detalajn kunvenprogramojn, sed mi limigos min je rubrikaj proponoj. Jen estas kelkaj.

| | |
|---|---|
| **Literatura Vespero:** | Komuna kantado — "La Espero".<br>Zamenhof kiel verkisto.<br>Kia estas la verkista stilo de S. Engholm?<br>Deklamado. |
| **Diskuta Vespero** | Ĉu vi scias la arton vivi?<br>Ĉu indas labori por la esperantomovado?<br>Kial la pacmovado estas malforta? |
| **Hungara Vespero.** | La verkistoj ĉirkaŭ Literatura Mondo.<br>Poemoj de Julio Baghy.<br>"La dolĉa portreto", F. Szilagyi.<br>"La Amo" kaj "La Vento" de Kalocsay. |
| **Skota Vespero.** | Bildoj el la lando de la avaruloj ...!<br>Ĉu la avareco de la skotoj estas mensogo?<br>Skotaj historioj. |
| **Demandosporto.** | aŭ "Dudek Demandoj". |
| **Prelega Vespero.** | Kiel estiĝis la esperantomovado en nia lando?<br>Kiaj estis la pioniroj?<br>La historio de UEA kaj SAT. |

| | |
|---|---|
| **Diskutvespero.** | Ĉu la militoj estas neeviteblaj?<br>Ĉu la esperantomovado estu politika?<br>Kiel aktivigi nian anaron?<br>Kio diferencigas la homojn de la bestoj?<br>Kio estas kulturo? |
| **Zamenhofa Vespero.** | "La Espero", prefere kun muziko.<br>Deklamado: "La Vojo" aŭ "Al la Fratoj".<br>Ĉu profitemo instigis Zamenhof krei la lingvon?<br>Kial ni festas la tagon de la libro? |

Nun mia konscienco ne permesas al mi ŝteli pli el la spaco de la gazeto, sed mi esperas, ke miaj proponoj donu al eventuala leganto ideon, kiel oni povas organizi la programojn. Multaj el la programpunktoj certe apartenas al la kategorio, kiun mi nomas "seka", sed ni elektu kaj porciigu la temojn! Kiel eble plej ofte ni kantu en la kunvenoj kaj donu al la junuloj la eblecon al pieda gimnastiko! Niaj kunvenoj povas konkuri kun la programoj de kiu ajn organizo. Jes, eĉ superi ilin!

*Einar Hult.*

---